Sur pago 53: Jan Kostecki: Antoni Grabowski.

Cena numeru 50 groszy.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.
Jarabono: en Polujo 6 złoty, eksterlande samvaloro de 6 orfrankoj.
La Redakcio ne resendas manuskriptojn; konservu kopion.

Redaktoro kaj Eldonanto:
STANISŁAW KAROLCZYK.

Subtenantoj:
Prof. Dr. ODO BUJWID
JAN KOSTECKI
Dr. EMILJAN LOTH
WŁODZIMIERZ MIERNICKI

ENHAVO:

Jan Kostecki: Antoni Grabowski. — VI Kongres Polskiego Tow. Esperantystów i Pol. Akademickich Tow. Esperantystów: Odezwa i Komunikat II. — Dr. Antoni Czubryński: Propagandaj direktivoj.—Ruch esperancki w Polsce.— Pola esperantista movado. — Miesiąc esperancki. — Ricevitaj gazetoj kaj libroj.

JARO XIX. WARSZAWA — Aprilo 1925 № 4 (114

Zebrania Polskiego Tow. Esperantystów w Warszawie (Królewska 19) odbywają się co środa od 8 do 10 wiecz., zaś kancelarja i bibljoteka czynne są w poniedziałki i środy od 7½ do 10 wieczór.

Niaj subtenantoj.

Nia gazeto, fariĝinta en la pasinta jaro privata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas tamen, almenaŭ en la komenco, la bonvolan materialan helpon de tiuj polaj Esperantistoj, al kiuj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ju pli da subtenantoj anonciĝos, des pli enhavoriĉa, luksa kaj des pli efika estos la „Pola Esperantisto",

unika esperanta revuo por Poloj.

La nomaron de la subtenantoj ni ĉ am presos sur la unua paĝo de la kovrilo.

Fariĝi subtenanto de „Pola Esperantisto" povas ĉiu persono, kiu enpagos monate po Zł. 20.—

Subtenantoj ricevas sen plua pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldono de

„Pola Esperantisto"

Widok 19, Warszawa.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XIX. WARSZAWA — Aprilo 1925 № 4 (1:4)

Antoni Grabowski.

Antoni Grabowski...

La plumo ŝanceliĝas en mia mano, kiam mi skribas tiun nomon. Tiom da fojoj jam, dum la du jaroj, kiuj pasis de l'momento de postmilita reviviĝo de „Pola Esperantisto", mi intencis honorigi lin per mia modesta vorto kaj ĉiam mankis al mi la kuraĝo.

Tamen la devo fariĝas pli kaj pli urĝa. Jam aperis nova generacio de polaj esperantistoj, kiu ne havis la feliĉon lin koni.

Kiel mi scios prezenti Vian bildon, mia kara, kara Prezidanto?

Ja tiu lingvo, kiun mi parolas, estas nur eta fragmento de la nekalkulebla trezoro, kiun Via kvinjara peno donacis al polaj esperantistoj, en la plej bona el la tuta mondo esperanta Vortaro! Sen Vi nur babili infane mi povus, dank' al Vi mi estas homo, kiu disponas pri sia vira parolo...

Ne la gloran Poezian Verkaron de Antoni Grabowski necese estas fiksi en la memoro. Ĝi restas kaj restos jarcentojn. Kiel potenca trumpsono en „Inflammatus" de Rossini ĝi flugos alte, fiere, tremige super la grizan ĉiutagecon homan.

Sed tion, kio malaperis por ĉiam kun lia lasta spiro, antaŭ tiu hebrea butiko ĉe strato Marszałkowska, kie haltigis lin esperantaj libroj en fenestro, kaj kie subita koratako ĵetis lin teren, — lian vivon, lin mem, la tiel amatan Patron de polaj esperantistoj ni konservu, laŭ niaj povoj, al admiro de novaj homoj, de estontaj tempoj.

Mi diras: laŭ niaj povoj. Ĉar, ho ve! tro palaj, certe, estos niaj vortoj. Kiu nekonis lin, tiu, legante liajn verkojn, povos eble lin diveni, sed neniam ekvidos lian bildon en ĝia tuta brilo. Okazas, ke homo mense laboranta fordonas sin senreste al sia tasko; lia laboro formanĝas lin; li fariĝas kiel maŝino por produkti belajn ideojn, belajn frazojn; sed rigardu lian vivon — kaj vi ekskuiĝos pro la kontrasto.

Kun Grabowski estis kontraŭe. Li kaj lia verko estis kvazaŭ duonarkoj de la gotika fenestro, en kiu aperis celanta supren diverskolora vitra imago de bela ekzisto.

Li estis reĝo inter ni, reĝo sen sceptro kaj soldatoj, sinjoranta per milda spirita riĉeco.

Li amis sian verkon. Kun fiera kaj feliĉa rideto de l'patrino li klinis sian belan, noblan kapon al ĝi. Kaj la verko rebrilis al sia kreinto. Ĉu mi forgesos lin iam, de tiuj tempoj antaŭlastaj, kiam li tradukis la „Tadeon!" Mi renkontis lin tie aŭ ie, en varsoviaj kafejoj. Estis vintro. Li sidis en pelta ĉapo — antaŭ li kelkaj kartetoj da papero, ĉiamaj krajono kaj gumo („mia korektisto" — li kutimis diri) — kaj en tiu majesta vizaĝo kun griza barbo, vizaĝo tiel profunde sentema kaj saĝa, oni rekonis ion parencan — malgraŭ diferenco de la trajtoj — al la leona kapo de Mickiewicz!

Kaj kiel li sciis siajn versojn legi! Mi memoras, estis dum la germana okupado. Sur la strato renkontis lin hazarde la jus veninta Varsovion germana majoro, esperantisto. Rekonante samideanon laŭ insigno (Grabowski ĉiam portis la stelon), li demandas: — „Ho, vi parolas esperante?" — „Jes, mi konas i o m e t e tiun lingvon". Li invitis la fremdulon al nia semajna kunsido (ni kunvenis tiam intime en la loĝejo de forestanta Kolonelo Günther), kaj al ni antaŭanoncis, ke venos nin viziti g e n e r a l o B e s e l e r! Kiam la falsa Beseler jam alvenis, kaj ni estis sufiĉe ridintaj pri la bona ŝerco (la germano malpli ol aliaj), Grabowski prenis el sia poŝo kelkajn jus verkitajn fragmentojn de la „Tadeo".

Li komencis deklami. Nelaŭte, kvazaŭ legante, sed kun kia plastika potenco! Neniam mi tion forgesos: estis interalie la „Koncerto de Jankiel." Ni, aŭskultantoj, ĉiuj travivis tiam tiun scenon! Ni vidis Zosia, petantan la maljunan muzikiston, ties movojn kaj ĝenon, la brilan aregon de napoleonaj soldatoj — kaj poste ni aŭdis kune kun ili la sorĉan improvizacion de „Jud' honesta, kiu patrujon amis, kiel Polo." Neeble estis fari pli, aŭ kiel tradukanto, aŭ kiel deklamanto. Jen, en la fulmo de tiuj momentoj, antaŭ ni aperis en sia tuta gloro la duondia spirito de la plej granda poeto pola!

Grabowski sciis esti gaja. La speco de lia humoro estis tiu de homo funde inteligenta kaj kultura, kiu multon travivis kaj spertis, kaj kiu post bone plenumita laboro bezonas iom da mensa ripozo, kaj trovas ĝin volonte en gaja rido, agrabla por li kaj por aliaj. Kiam ridis la Prezidanto (kaj li faris tion ofte), tiam ridis ankaŭ ni ĉiuj. Ho la bona, senĉagrena rido de tiuj neforgeseblaj tempoj!

Grabowski, nobla spirite homo, devis, nature, esti por ĉiuj ĝentila kaj afabla. Juna sekretario de la societo, mi venis kelkfoje al li, portante iajn paperojn por subskribo. La unuan fojon kun iom da komprenebla timo, kiu tamen tuj forpasis, kaj plu jam ne revenis. Ĉar li volis esti tiel simpla, tiel bonkora! Li, nia Patro, sciis malfermi sian animon al ĉiu amiko de la komuna ideo. Mallonge dirante, anstataŭ la supozataj kvin minutoj, mi sidis ĉe li pli ol du horojn. Kiam mi eliris, mi marŝis kvazaŭ en sonĝo. En mia kapo svarmis ĉarma amaso da belaĵoj, eroj de liaj poezioj, kiujn li havis la bonecon al mi legi. Se iu en la vivo faris min esperantisto, estas li, la alloga Princo de Parnaso!

Ve, trifoje ve! Nelonga estis mia naĝo en tiu supera sfero, kiun tranĉas flugiloj de Pegazo. Silentiĝis bardo nia kara. Kaj la junaj filoj de la orfigita pola esperantistaro ne konas doĉan voĉon, kiu estis nia ĝojo kaj fiero, kiu estis, vere, gaudium generis humani...

Linquenda tellus. Laŭ eterna leĝo malaperas la homoj. Sed en niaj koroj, en niaj cerboj restas rememoro. Pri bona homo, granda homo, niaj memoraĵoj estas similaj al floroj. El tiuj floroj ni faru kronon por nia patro, ho esperantistoj polaj! Lia amata persono ne perdiĝu en la nigra nokto, kiu englutas ĉiun morton. Ni lasu vidi lin al la junaj, kiuj venas post ni.

Ankaŭ vi, eksterlandaj amikoj, fratoj en la idealo, kiuj konis lin, kaj ne forgesis lin, ne ŝparu momenton de laboro por tiu pia celo.

„Pola Esperantisto" malfermas vaste siajn kolonojn al ĉiu rememoro pri Antoni Grabowski. Eĉ plej malgrandan ni salutos kun ĝojo. Ni kolektos ĉiujn zorgeme. Estonte eble formiĝos libro, eldonota aparte.

Unua parolo apartenas nun al Leo Belmont, nia malnova pioniro, tiu „Vivanta Penso" inter la esperantistoj. Lia kompetenta artikolo estas eltiraĵo el la parolado, kiun li faris ĉe solena vespero al honoro de Grabowski, kelkajn monatojn, apenaŭ, post lia morto. Ni dume presos la artikolon pole, kiel ĝi estis skribita.

Jan Kostecki.

VI Kongres Polskiego Tow. Esperantystów
i Polskich Akademickich Towarzystw Esperantystów.

Warszawa, 30-31 maj i 1 czerwiec 1925 r.

ODEZWA.

Polskie Tow. Esperantystów, najdawniejsza polska organizacja esperancka, stworzona na terenie b. Królestwa Polskiego w r. 1906, już w latach niewoli stała się największym ośrodkiem całego ruchu esperanckiego w Polsce. Twórca esperanta, Dr. Ludwik Zamenhof, był jej Członkiem Honorowym, zaś na jej czele stali najwybitniejsi esperantyści polscy, cieszący się zasłużoną sławą międzynarodową: znakomity poeta Antoni Grabowski, świetny prozaik dr. Kazimierz Bein, Adam Zakrzewski, Leo Belmont, A. B. Brzostowski, płk. Jan Günther i w. in. Już w owych czasach Towarzystwo, świadome swej roli reprezentacji narodu polskiego wobec wszechświatowego ruchu esperanckiego, szeregiem doskonałych przekładów czołowych utworów literatury naszej na język międzynarodowy uprzystępniało skarby kultury polskiej cudzoziemcom.

Wraz ze zdobyciem Niepodległości rozszerzył się zakres działania Towarzystwa na całe terytorjum Rzeczypospolitej, a zarazem esperantyści polscy uzyskali nierównie szerszą możność informowania zagranicy o sprawach polskich, nietylko już w dziedzinie literackiej, ale także politycznej, społecznej, obyczajowej, w tym wszystkim, co nawiązuje węzły zrozumienia i sympatji między kulturalnymi ludami świata.

Tę dążność Towarzystwa do wykorzystania już dzisiaj młodzieńczej **mowy wspólnej narodów** dla dobra ukochanej ojczyzny stwierdziła i utrwaliła w sposób uroczysty t. zw. „Deklaracja oznańska", przyjęta przez IV Kongres Towarzystwa w r. 1923.

Oto jej zasadnicze fragmenty:

„Stwierdzamy, że język Esperanto bynajmniej nie ma na celu usunąć w przyszłości języków narodowych, lecz wprost przeciwnie, uwalniając od konieczności studjowania wielu języków obcych, umożliwić przez to samo gruntowniejsze poznanie mowy ojczystej."

„Stwierdzamy, że jak to wykazała dotychczasowa działalność Towarzystwa od pierwszej chwili jego istnienia, Esperanto już dzisiaj sprawie narodowej okazywać może znaczne usługi, roznosząc po całym świecie wiadomości o Polsce o jej historji i kulturze, ideałach i dążeniach, a także pośrednicząc w nawiązaniu z zagranicą stosunków handlowych."

„Świadomi obowiązków, jakie nakłada na nas ustawiczne stykanie się z przedstawicielami wielu narodów, oświadczamy, że Polskie Tow. Esperantystów i jego poszczególni członkowie i nadal, przy każdej nadającej się sposobności, służyć będą interesom Ojczyzny, czy to informując o niej zagranicę, czy starając się zacieśnić węzły przyjaźni łączące ją ze sprzymierzeńcami z zachodu, czy wreszcie zbijając oszczerstwa jej wrogów."

„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie"

Mocne i wyraźne podkreślenie polskiego charakteru Towarzystwa bynajmniej nie uwłacza wzniosłemu dążeniu do zbratania narodów, które nieodłącznie towarzyszy wielkiej idei języka międzynarodowego.

Język Esperanto, język narodów na ziemi polskiej zrodzony, stanie się niewątpliwie potężną podwaliną pojednania zwaśnionych ludów i trwałego pokoju świata, ogromnym krokiem naprzód w dziejach postępu człowieka.

O te hasła walczy polski legjon esperancki, wierny miłości ojczyzny, wpatrzony w przyszłe czasy.

Zjednoczenie wysiłków wszystkich Esperantystów — Polaków, wszystkich polskich sympatyków naszej idei, pod wspólnym sztandarem Towarzystwa jest niezbędnym warunkiem siły i rozwoju naszego ruchu.

W 12 miastach istnieją obecnie Oddziały Towarzystwa. Oto ich lista: Warszawa, Łódź, Wilno, Poznań, Kraków, Lublin, Pabjanice, Koluszki, Olkusz, Ruda Pabjanicka, Zduńska Wola, Zawiercie. W Niemczech miejscowości esperanckich jest blisko 1000, w Anglji i Francji po kilkaset!

VI Kongres Towarzystwa ma być przeglądem generalnym naszych sił polskich. **Nie wątpimy, że po tym Kongresie liczba Oddziałów conajmniej się podwoi**. Wymaga tego duma Polski, ojczyzny Esperanta!

Esperantyści — Polacy! Stańcie wszyscy do apelu! Zapisujcie się bezzwłocznie na Kongres, zachęcajcie innych!

Niech te Zielone Święta 1925 r. będą i dla Gwiazdy Zielonej w Polsce uroczystością, która otworzy nowy wspaniały okres rozwoju!

Komitet Organizacyjny.

Adres Kongresu: Pola Esperanto - Kongreso, Warszawa, Leszno 72 m. 3,

Składka: Uczestnicy popierający zł. 9. —
zwykli . . . . . „ 3.—
ucząca się młodzież . „ 2.—

Pieniądze należy przesyłać tylko pod powyższym adresem na ręce Skarbnika Kongresu Tadeusza Grabowskiego.

VI Kongres Polskiego Tow. Esperantystów i Polskich Akademickich Towarzystw Esperantystów.

Warszawa 30-31 maja, 1 czerwca (Zielone Świątki) 1925 r.

Komunikat II.

Komitet Honorowy: Komitet Organizacyjny postanowił zaprosić do Komitetu Honorowego, prócz osób wymienionych w komunikacie 1-ym, inż. Eugenjuszą Tora oraz inż. Edwarda Kosteckiego z Krakowa.

Porządek obrad Kongresu:

1. Sprawozdanie Zarządu Centralnego.
2. Sprawozdanie Oddziałów P. T. E.
3. Referaty o metodach propagandy.
4. Wolne wnioski oddziałów i członków.

Komitet uprasza o nadsyłanie wniosków najpóźniej do dnia 15-ego maja r. b.

Tymczasowy program:

Sobota, dn 30 maja:

Wieczorem wstępne zebranie towarzyskie.

Niedziela, dn 31 maja (przed południem)

1. Uroczysta msza św. na intencję kongresu.
2. Złożenie wieńców na grobach Mistrza i jego małżonki oraz śp. Antoniego Grabowskiego.
3. Uroczyste otwarcie Kongresu.

Wieczorem:

4. Koncert esperancki i zabawa taneczna.

Poniedziałek, 1 czerwca: (przed południem)

5. Drugie posiedzenie i zamknięcie Kongresu.

Po południu:

6. Wewnętrzna Konferencja Akademicka.
7. Wycieczka za miasto.
8. Pożegnalna kolacja.

Uwaga: Podczas zabawy radio-audycja.

Opłatę kongresową prosimy nadsyłać **tylko** na ręce skarbnika kongresu p. Tadeusza Grabowskiego, Warszawa, Leszno 72, m. 3.

Adres dla wszelkich innych przesyłek: Pola Esperanto-Kongreso, Warszawa, Leszno 72, m. 3.

Sekretarz:
Jan Ferencowicz.

Prezes:
Jan Kostecki.

Propagandaj direktivoj.

(Pensoj destinitaj al niaj propagandaj ĉefuloj kaj institucioj por afabla pripenso).

I.

Ne pri ordinara propagando ĉiutaga, bone konata al ĉiu samideano mi volas paroli, sed pri direktivoj atingantaj pli ampleksan estontecon. Ne pri la propagando en mia lando sed pri ĝenerala, monda, ekkonita el la gazetaro esperantista kaj el senperaj interrilatoj kun alilandaj samideanoj.

Per si mem sole oni ne povas vivi. Tial oni grupiĝas en la societoj, kiuj donas la okazon por interŝanĝo de la esp. ideologio kaj perfektiĝo en la lingvo. En endroniĝo en la societa vivo naskiĝas unu danĝero bone konata por ĉiu esp propagandisto, kiun eble ĝis nun ankoraŭ oni ne provis difini. oni elviviĝas pure en societa vivo, ĉar tio-ĉi estas la plej simpla vojo, oni en la societo havas okazon poroli, prelegi, aŭdi Esp., eĉ ludi, ŝerci, danci. Ekster la societo: rigida neŭtraleco de neesperanta publiko, tuj preta moki tion, kio por samideanoj estas ŝatinda, aŭ eĉ sankta. Oni tuj estas preta denove, naive starigi demandon „ĉu efektive oni povas paroli Esperanton" k. t. p. — bonege konataj demandoj... Sekve antaŭ la malfortvola samideano videbliĝas du vojoj: unu mola, societa, luda; alia peza, de obstina kontraŭbatalado de obstina indeferenteco. Oni kompreneble elektas la unuan: oni droniĝas en societaj molaj amuzoj ĉiusemajne minimume unu tagon kaj jen la iluzioj de la progreso: interne oni disvolviĝas certe — tio-ĉi ĉio nepre estas necesa, mi havas nenion kontraŭ tio, sed ekstere ĉu oni disvolviĝas? ĉu multe da personoj post tiuj belaj vesperoj infektiĝis per la esperantismo? Tial mi opinias, ke devas ekzisti harmonio inter la interna vivo societa kaj ekstera ekspansiveco de la esperantisma ideo. Ne forgesu pri la unua, zorgu tamen pri la dua.

Sobraj propagandistoj eliras el la societo en la mondon eksteran propagandi. Sed ili tion-ĉi faras naive. Ĉiun voli varbi, ĉiumomente, monoideisme, por nia ideo signifus la samon, kiel doni ĉiumomente kaj al ĉiu persono la saman manĝaĵon. Antaŭ ĉio, oni devas turni sian atenton je la gazetaro. Ekposedi la gazetaron, egalas ekposedi influon je la milionoj da homoj. Nenia propagando anstataŭigos influon per la gazetaro. Ĉiuj niaj zorgoj povas alcentriĝi por varbi ĝin, senpere, per konatuloj, — aŭ fine per la alvokoj al la gazetaro, ke oni promesas al ili sendi la sciigojn pri progresoj de nia movado. Kaj por tiu-ĉi celo devas fondiĝi kapitalo, la komitatoj sciigantaj la enkondukon de Esp. en apartaj landoj.

Nekredeble, kaj tamen vere estas, ke oni donas al la gazetaro ofte artikolojn plibonigantajn falsajn opiniojn pri Esp., se iu presos ilin, sed pozitive memspontane oni ne presas la artikolojn. Sed ni evitu la ĝeneralaĵojn: tion-ĉi jam la publiko konas, sed ni presu la progresojn nure: ekz., ke en Magdeburgo 1400 infanoj lernas Esp. Tiaj „esperantaj gutoj" en multe legata kroniko de la ĵurnaloj pli profunde traborados granitajn ŝtonegojn de indiferentulaj cerboj, ol la plejbelaj artikoloj pri esperantismo ĝenerale.

Ni zorgas pri estonteco, kaj forgesas la estintecon. Kaj tamen devus ekzisti jarlibro dulingva franca kaj esperanta, enhavanta la statistikon de la nuna situacio en Esperantujo, en kiuj lernejoj oni Esp. instruas, al kiom da lernantoj, de post kiam k. t. p. Se iu demandas, precipe la lernejaj, aŭ klerigaj aŭtoritatoj, la statistikon, oni nune unue devas zorgi pri la kolekto de diversaj sciigoj en „Heroldo de Esperanto", aŭ en la aliaj revuoj, anstataŭ havi ĉion sub la mano. Ĉu ne estus preferinde doni la koncizan statistikon en bone konata al ĉiuj diplomatoj kaj scienculoj franca lingvo kun paralela teksto esperanta? Tiu-ĉi libro, enhavanta samtempe katekisman demandaron de nia esp. ideologio, mankas ĝis nun, kaj oni nenion faras por ĝin verki: Mi atentigas niajn direktantajn ĉefulojn pri tiu-ĉi manko kaj demandas ĉu ili volas ion entrepreni por helpi al ni. Ĉu oni devas miri, ke la ĵurnaloj anstataŭ ĉerpi el la sanaj fontoj, suĉas siajn fingrojn kaj fantaziumas pri Esperantismo elvokante ĉe ni samtempe la koleron kaj la ridon? Tamen ni pripensu, ĉu la peko estas nur iliaflanka?

II.

Tri aferoj estas nepre necesaj por ke helpa lingvo fariĝu la proprajo de la tuta homaro:

1) ke ĝi estu en kabineto eltrovita,

2) ke ĝi eliru el kabineto kaj kreu *la socian movadon*,

3) ke ĝi estu devige enkondukita en la lernejojn de ĉiuj landoj. Ni staras nune je la dua punkto, kaj celas atingi en koro la epokon trian. Tamen ne ĉiuj scias ankoraŭ pri la dua epoko, ekz. Renè de Saussure kaj Lingva komitatano S-ro J. Schmid el svisa Berno.

Sinjoro J. Schmid! Kiu kreos al vi la „nov-esperantan" *movadon*, se la proponoj de viaj ŝanĝoj gramatikaj estus eĉ akceptotaj? Kiu ekflamigos la korojn de niaj poetoj, por ke ili denove traduku la poemojn jam tradukitajn, kiuj per viaj ŝanĝoj tuj estus detruitaj, ĉar la finoj de la vortoj en la poezio estas gravaj demandoj. Ĉu vi ne vidas, kian konfuzon enkondukis la simpla, kaj efektive nedanĝera anstataŭigo de-ujo en-io (Francujo en Francio)?

Tial ni fine ĉesu diskuti pri la *lingvo*, respondante al tiuj, kiuj volas tion fari: ke la esperantismo estas *la sola movado*, kiu povas al iu plaĉi, aŭ ne, *sed kiu ekzistas*. Se iuj volas fari novajn projektojn, respondadu al ili: se tio plaĉas al Vi, Vi tion-ĉi faru, sed zorgu pri la *socia movado!* Kion estus farinta nia Majstro, se li estus kreinta nur la lingvon, kaj liaj helpantoj en ĉiuj landoj ne estus kreintaj la *movadon?*

Sekve ĉiuj submetoj de nia lingvo al novaj esploroj de diversaj komitatoj, ligoj, registaroj „por elekto" estus memmortigoj, malsaĝegaĵoj. Cetere kion signifas eĉ la plejfavora por Esp. opinio, devenanta de ne-esperantisto, se li estas en tiu-ĉi afero tute malkompetenta. Ĉu ĝi ne similus la favoran aŭ malfavoran opinion pri ĥemio de iu ne-ĥemiisto, kaj ĉu ĥemiisto kiu serĉus tian opinion ne estus simple freneza?

Estas tiom da diversaj religioj en la mondo, kaj en ili tiom da konfesioj. Ili ĉiuj celas „la veron". Tamen ni kaj ili scias, ke la vero povas esti nur unu. Sekve iu el ili devas esti gardanto de „malvero". Ĉu tamen la modernaj konstituciaj ŝtatoj demandas pri tio? Tute ne! Ili demandas nur: kia estas via *organisa forto?* Ĉu vi kreis *socian movadon?* Vi pripensu kiajn sekvojn havus la elekto de iu el tiuj sistemoj religiaj kiel „vera".

Ni rigardas la sunan estontecon kun plenaj esperoj. Se ĝi ne estus al ni la gvida stelo, se esperantista movado ĉiam restus je la sama punkto kiel nun, ĝi ne valorus la laboron. Ni laboras por la estonteco. Sed kiel ĝin pliproksimigi?

Antaŭ tri jaroj mi opiniis, ke sufiĉus, se kelkaj ŝtatoj konstituciaj promesus enkonduki Esp. en la lernejojn, se aliaj same konsentus. Oni invitis la ŝtatojn por la subskribo de la akordo. Sed la respondoj estis ridindaj. Oni ne respondis *rekte* je la demando. Tiam oni ĵetis la alvokon: ni enkonduku Esp. en la lernejoj tie, kie oni tion permesas; ni ne bezonas interŝtatan konsenton. Se ĝi eĉ okazus, ni ne havus sufiĉe da instruistaj fortoj por antaŭenpuŝi la aferon en ĉiuj lernejoj. Kelkaj ministerioj de publika instruado volonte donis je la dispono de esperantistoj la lernejojn, sed mankis la instruistaj fortoj por ke oni povu ĉie instrui. Tiam oni diradis:

En nunaj cirkonstancoj oni povus pli multe fari por Esp. en la lernejoj, sed ni ne havas sufiĉan kvanton de instruistoj, se eĉ oni interŝtate konsentus enkonduki Esp. en la lernejoj devige.

Ĉar oni ne konsentis interŝtate enkonduki Esp. en la lernejoj, tial ni ne havas la sufiĉan kvanton de instruistoj, ĉar oni ne volas sin prepari por tiu-ĉi okupo ne havante sufiĉan garantion de daŭra, salajra gajno por la vivsubteno.

Kio en la unua konkludado estis la kaŭzo, tio en la dua estis la sekvo kaj kontraŭe. La plej taŭgaj esp. kapoj komprenis,

ke ie kaŝiĝas la eraro, sed vane cerbuminte, ili revenis al la ordinara ĉiutaga laboro, aŭ droniĝis en kluba vivo, vivante per la iluzioj de progreso.

Tamen la eraron oni devas malkovri. Interkonsento interŝtata estas nepre necesa, se ne nun, do post nelonga tempo. La domon oni povas konstrui eĉ dekon da jaroj, sed oni devas havi la firmajn fundamentojn. Kaj tamen ni ĉiam ne estas ankoraŭ firmaj. Oni ripetas la samajn naivajn argumentojn kiel en 1887. Se oni tiajn argumentojn aŭdus ekz. en ĥemio, aŭ astronomio, oni simple respondus al la persono: „vi bonvolu konatiĝi kun tiu-ĉi scienco, anstataŭ prezenti vian malkonon. Tiam vi konkludu, sed ne antaŭe". Oni diradis:

La ŝtatoj devas interkonsenti. Tiam ni havos la firman fundamenton por nia laboro. Nia estonteco kaj estinteco estos certa.

La diplomatoj en Ligo de Nacioj konkludis, ke tiu-ĉi afero ilin pli malpli ne interesas, kaj ne volis diskuti pri ĝi, ne koninte ĝin profunde.

Ni ĉesu ludi kun tiuj konkludoj tute sur la falsaj vojoj. Oni ne petu de la aŭtoritatoj (égale ĉu ministerioj, Ligo de Nacioj, privataj institucioj kaj homoj apartaj), ke ili diskutu pri la aferoj ekster ilia kompetenteco kaj ekster eĉ la plejsurfaca kono. Oni kontraŭe klarigu al ili ilian nescion kaj kompletan malkompetentecon, sed samtempe la gravecon de ilia decido en la direkto de subteno de la demando de helpa lingvo Esp. kaj tiam, ricevinte de ili la konsenton pri graveco de la afero, vi ĉiam kie eble faru la rezoluciojn, ke oni konatiĝu kun la esperantista *movado*, delegu por tiu-ĉi afero apartajn homojn, demandu de ili la prezentadon de la raporto pri *movado* (ne nur lingvo!), kaj tiam postulu, ke oni favore voĉdonadu por la subteno de *movado*. La rezolucio estu plimalpli jene redaktata:

..konsiderinte la gravecon por la ĝenerala progreso de helpa lingvo internacia petas siajn por tiu-ĉi celo destinatajn anojn konatiĝi kun la ĝisnuna matureco de esperantista *movado*, kaj prezenti la raporton pri ĝi, kun la ekopinio, kiagrade (nomo de la institucio)... povus subteni la suprenomitan socian *movadon* kaj adapti ĝin kun bona utilo en tiu-ĉi institucio.

Tiamaniere ni ĉesu demandi opinion de nekompetentuloj pri *lingvo*, kaj ni malfermu al ili opinion por la utiloj de nia *movado*. Tiu-ĉi taktiko estas pli deca kaj samtempe pli valora, ol la ĝisnuna turnado ĉirkaŭ la sama punkto kun iluzioj de progreso. Sed por bone efektivigi tiun-ĉi celon ni bezonas ĉiujare tre detalajn statistikajn jarlibrojn.

Mi atentigas niajn ĉefulojn en nia *movado*, en ĉiuj landoj. De vi dependas la efektivigo de tiuj proponoj kaj detaligo de supre *skizita* programo.

Dr. Antoni Grabowski

Ruch esperancki w Polsce.

Warszawa.

Dn. 25. III. odbyło się czwarte z rzędu literackie zebranie Polskiego Tow. Esp. i Polskiego Akad. Tow Esper. Przemawiał Dr. Antoni Czubryński o Twardowskim w porównaniu z Faustem. Ciekawy ten referat był powtórzeniem odczytu, wygłoszonego przed kilku dniami publicznie.

W końcu marca, na zebraniu specjalnych delegatów wszystkich towarzystw warszawskich, stworzono Biuro propagandy prasowej przy pomocy Esperanta. Biuro to jest, obok memorjału, wystosowanego przed kilku miesiącami do Ministerjum Ośw. Publ. jednym z najrealnieiszych owoców prac Reprezentacji międzystowarzyszeniowej. Oto widoczny dowód do czego może doprowadzić wzajemne zaufanie towarzystw i chęć służenia drogiej dla wszystkich, choć może różnie rozumianej, idei języka międzynarodowego.

Dn. 1. IV. odbyło się piąte zebranie przy bardzo licznym udziale członków oraz zaproszonych gości. Przemawiał pan Leo Belmont n. t. „W jaki sposób zamordowaliśmy Dra Esperanto". Doskonała ta humoreska pobudziła wszystkich do serdecznego śmiechu. Ale autor, prócz krytyki pierwszych kroków ruchu naszego w Warszawie, dał doskonały obraz tych wszystkich trudności, które piętrzyły się na każdym kroku, oraz borykania się z opinją, która była wrogo do Esperanta usposobiona po nieudanej próbie Volapüku. Co zaś najważniejsze, że autor przeprowadził w mistrzowski sposób kilka myśli z ideologji esperanckiej. Prelegent zakończył zebranie deklamacją jednego ze swych poetyckich utworów. Sukces był natychmiastowy: kilku z obecnych gości odrazu wstąpiło do naszej pokojowo-walczącej armji.

Częstochowa.

W uzupełnieniu naszych wiadomości z Częstochowy nadmieniamy, że liczba uczęszczających na kursy esperanckie wzrosła do 250 osób.

Pola esperantista movado.

Varsovo.

La 25. III. okazis kvara laŭvice literatura kunveno de Pola Esperanto-Asocio kaj Pola Studenta Esperantista Societo. Paroladis D-ro Antoni Czubryński pri pola sorĉisto Twardowski en komparo kun Faust. La interesa prelekcio estis ripeto de la parolado, okazinta antaŭ kelkaj semajnoj publike

Fine de marto, dum la kunveno de specialaj delegitoj de ĉiuj varsoviaj societoj, oni starigis Oficon de gazeta propagando pere de Esperanto. La ofico estas, ĉe la memorialo, adresita antaŭ kelkaj monatoj al la Ministerio de publika klerigado, unu el la plej realaj fruktoj de la laboroj de l'Intersocieta Delegitaro. Jen videbla pruvo kion povas atingi reciproka fido de la societoj kaj volo de servado al kara por ĉiuj, kvankam eble malsame komprenata, ideo de lingvo internacia.

La 1. IV. okazis kvara kunveno, kiun ĉeestis multaj membroj kaj invititaj gastoj. Paroladis s-ro Leo Belmont je temo: „Kiamaniere ni mortigis Dron Esperanto". Tiu bonega humoraĵo igis ĉiujn al kora rido. Sed la aŭtoro, krom kritiko de unuaj paŝoj de nia movado en Varsovo, donis bonegan bildon de ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj altiĝis je ĉiu paŝo, kaj de la luktado kun la opinio, kiu estis malamika kontraŭ Esperanto post la malsukcesa provo de Volapük. Tamen plej grava estis, ke la aŭtoro montris majstre kelkajn pensojn el la esperanta ideologio.

La preleginto finis la kunvenon per deklamo de unu el siaj poetaj verkoj Sukceso estis tuja: kelkaj el la ĉeestintaj gastoj aliĝis al nia pace-batalanta armeo.

Częstochowa.

Komplet gante niajn informojn el Częstochowa, ni aldonas, ke nombro de gelernantoj de esp. kursoj kreskis al 250 personoj. Gvidantaro

Kierownictwo kursów było zmuszonem do podzielenia wszystkich na 3 kursy, z których pierwszy prowadzi miejscowy delegat U. E. A. pan Józef Grygosiński, drugi pani Róża Szumacherowa, trzeci inż. Ludwik Trochimowski. Oprócz tego p. Bolesław Głuchowski prowadzi kurs w seminarjum nauczycielskiem.

Lublin.

Odbył się w Lublinie odczyt p. Seweryna Przybyszewskiego o „Radio" pod protektoratem czynnego Oddziału Polskiego Tow. Esperantystów w Lublinie.

Zawiercie.

Dn. 22 stycznia b. r. zawiązało się w Zawierciu Koło Esperantystów liczące 23 członków. Do Zarządu Koła wybrano następujące osoby: ks. Ludwik Klepaczewski — prezes, p. Max. Sikorski — sekr., p. Edward Nowak — skarbnik.

W ubiegłym miesiącu Koło przystąpiło do Polskiego Tow. Esper. jako Oddział w Zawierciu.

Kraków.

Przed niejakim czasem założono tutaj „Polski Klub Esperantystów". W końcu ubiegłego miesiąca otrzymaliśmy od sekretarza klubu p. Juljusza Krissa następujący komunikat:

W „Polskim Klubie Esperantystów", którego głównym celem jest propaganda Esperanta w kołach polskiej inteligencji i u rządu, a z drugiej strony rozszerzanie kultury polskiej za pomocą Esperanta zagranicą, zostały wybrane do zarządu następujące osoby: Inż. Eugenjusz Tor dyrektor miejskiego Muzeum przemysłowego jako prezes, inż. Edward Kostecki dyrektor państwowej Szkoły przemysłowej jako pierwszy wiceprezes, Dr. Wincenty Eminowicz wyższy radca miejski jako drugi wiceprezes, Juljusz Kriss urzędnik banku jako sekretarz i prof. Dr. Zygmunt Tarliński, dyrektor banku Bronisław Winiarz, wyższy kontroler Bronisław Kuhl, wreszcie Władysław Grabowski urzędnik ubezpieczeniowowego Towarzystwa jako członkowie zarządu.

de la kursoj estis devigita dividi ĉiujn en 3 kursojn, el kiuj la unuan gvidas loka delegito de U. E. A. S-ro Józef Grygosiński, la duan S-ino Róża Szumacher, la trian inĝ. Ludwik Trochimowski. Krom tio s-ro Bolesław Głuchowski gvidas kurson en instruista seminario.

Lublin.

Okazis en Lublin parolado de s-ro Seweryn Przybyszewski pri „Radio" sub protektorato de la agema grupo de Pola Esperanto-Asocio en Lublin.

Zawiercie.

La 22 de januaro k. j. estis fondita en Zawiercie Esperantista Rondo konsistanta el 23 personoj. Al estraro de la Rondo oni elektis jenajn personojn: pastro Ludwik Klepaczewski—prezidanto, S-ro Max. Sikorski—sekretario, S-ro Edward Nowak—kasisto. En la pasinta monato la Rondo aliĝis al Pola Esperanto-Asocio, kiel Grupo en Zawiercie.

Kraków.

Antaŭ kelka tempo estis fondita tie ĉi „Pola Esperantista Klubo". Fine de la pas. monato ni ricevis de sekterario de la klubo s-ro Juljusz Kriss la sekvantan komunikon

„En „Pola Esperantista Klubo" kies ĉefa celo estas propagando de Esperanto en rondo de pola inteligentularo kaj ĉe la registaro, kaj duaflanke peresperanta diskonigo de pola kulturo eksterlande, estis elektitaj al estraro la jenaj personoj: Inĝ. Eugenjusz Tor direktoro de urba Muzeo industria kiel prezidanto, inĝ. Edward Kostecki direktoro de ŝtata Lernejo industria kiel unua vicprezidanto, D-ro Wincenty Eminowicz magistrata supera konsilanto kiel dua vicprezidanto, Juljusz Kriss bankoficisto kiel sekretario kaj prof. D-ro Zygmunt Tarliński, bankdirektoro Bronisław Winiarz, sup. kontrolero Bronisław Kuhl, fine Władysław Grabowski oficisto de asekura Societo kiel estraranoj.

Klub rozporządza wielką siedzibą, znajdującą się w Muzeum Przemysłowem, ul. Smoleńska 9 II p. i urządza w każdy poniedziałek o 19 — 21 godz. zebrania. Na kurs, otworzony przed kilku tygodniami, który prowadzi p. Kuhl, uczęszcza przeszło 30 osób Nowy kurs rozpocznie się wkrótce. Zarząd robi poważne starania u Rządu w celu wprowadzenia Esperanta do szkół. Klub między tutejszymi uczniami bardzo propaguje Esperanto, że prawie w każdem gimnazjum egzystuje już esp. koło".

W ostatniej chwili dowiadujemy się, że „Polski Klub Esperantystów", aby skonsolidować naszą pracę w kraju, postanowił przyłączyć się do ideowo pokrewnego sobie Polskiego Tow. Esperantystów.

La klubo disponas je granda ejo, troviganta en Muzeo Industria, Smoleńska str. 9 II et. kaj arangas ĉiulunde 19—21 h. kunvenojn.

La malfermitan antaŭ kelkaj semajnoj kurson, kiun gvidas s-ro Kuhl, vizitas pli ol 30 personoj. Nova kurso komencigos baldaŭ. La Estraro de la klubo faras seriozajn klopodojn ĉe la registaro pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Inter ĉi-tieaj lernantoj oni multe propagandas por Esperanto kaj en ĉiu preskaŭ gimnazio ekzistas jam esp. rondeto".

Lasthore ni ekscias, ke „Pola Esp. Klubo", por firmigi nian laboron en la lando, decidis aliĝi al idee parenca Pola Esperanto-Asocio.

Bełżyce.

Tutaj pan Henryk Szwarc rozpoczął przed niedawnym czasem prowadzić kurs esperancki. Zainteresowanie dla naszej sprawy wzrasta — miejscowi esperantyści czynią starania, aby założyć w Bełżycach Oddział Polskiego Tow. Esper.

Bełżyce.

Tie ĉi s-ro Henryk Szwarc komencis antaŭ nelonge gvidi kurson esperantan. Interesiĝo por nia afero kreskas — la loka esperantistaro klopodas pri fondo de Grupo de Pola Esp. - Asocio.

Prosimy wszystkich esperantystów o nadsyłanie wiadomości z ruchu naszego w Polsce do kroniki „Polskiego Esperantysty". Bogata kronika wznieca w ideowcach nowy zapał do pracy.

Miesiąc esperancki.

Jeden z **najpoważniejszych organów dla celów radja.** „Experimental Wireless", dołączył do lutowego wydania list, którego treść jest następująca. — „Z powodu przychylnej dla Esperanta opinji „American Radio Relay League", redakcja „Experimental Wireless" postanawia w każdym numerze zamieszczać artykuły o Esperancie lub w języku Esperanto; już w grudniu r. u. był wydrukowany 6-cio stronicowy kurs, który zawierał gramatykę Esperanta ze słowami i zdaniami tyczącymi się spraw radja, w styczniu r. b. był opublikowany 5-cio stronicowy angielsko-esperancki słownik, który zawierał wszystkie najczęściej używane w stosunkach komunikacji radjowej słowa, jakoteż konwersację pomiędzy dwoma amatorami w języku angielskim

i esperanckim. Lutowy numer był rozesłany na cały świat (Polskie Tow. Esp. również go otrzymało). Numer ten zawierał 5-cio stronicowy esperancko-angielski słownik dla spraw radja. Redakcja „Experimental Wireless", o ile świat esperancki wydawnictwo poprze, zamierza zarezerwować po jednej albo dwie strony dla artykułów technicznych w języku Esperanto i przeto zainteresować potrafi obcokrajowych radio amatorów. Cena roczna wynosi 20 franków szwajcarskich".

W numerze 5 „Heroldo de Esperanto" znajdujemy wiersz poety łódzkiego Stanisława Brauna, pod tytułem „Mi ĉizis".

Miasto Gdańsk pragnie, aby w roku 1927 odbył się w nim przypadający na ten rok wszechświatowy kongres esperancki.

„Espero Katolika" w numerze 6 przypomina o **zdobyczach zeszłorocznych Esperanta,** które należałoby również prasie naszej polskiej uprzytomnić:

1) Rezolucja Ligi Narodów, zaliczająca język Esperanto do języków jasnych w stosunkach telegraficznych i radjotelegraficznych, która jest jednocześnie uznaniem Esperanta przez Ligę Narodów.

2) Dekret pruskiego ministra oświaty z dnia 10. III. w sprawie wprowadzenia języka Esperanto do szkół.

3) Przygotowawcza konferencja w Genewie 22. IV. dla międzynarodowego porozumiewania się radjotelefonicznego, reprezentowana przez 39 stacji, towarzystw i przedsiębiorstw Radio z rozmaitych państw; pomiędzy uczestnikami dziesiątki osób znały i używały Esperanto.

4) Przychylna dla Esperanta opinja „Angielskiego Towarzystwa szerzenia wiedzy".

5) Zastosowanie Esperanta w radjotelefonji.

6) Sprzyjanie ruchowi esperanckiemu powszechnie znanych dzienników „Berliner Tageblatt" i „Berliner Börsen Courier".

Dr. Hideo Jagi z Kioto w Japonji nadesłał polskim esperantystom i jednocześnie, jak pisze, redakcji „Polskiej Gazety Lekarskiej" następującą informację:

„Język Esperanto wśród lekarzy japońskich znajduje wielkie uznanie i szybko się szerzy. **Cesarska Japońska Akademja w Tokio** w grudniu r. ub. jednogłośną uchwałą przyjęła i zaleca Esperanto jako oficjalny język dla medycyny.

W Kioto, w zakładzie patologicznym prof. Fazinami (znanego parazytologa i odkrywcy t. zw. „Schizostoma Japanense)“ pod kierunkiem Dr. Hideo Jagi odbywają się stale **kursa Esperanta dla 20 lekarzy i medyków.** W samem Kioto jest więcej niż **100 lekarzy władających językiem Esperanto“.**

Wielka **sekta religijna japońska** „Oomoto“, w której niektórzy upatrują przyszły „chrystjanizm Wschodu“, rozesłała do wszystkich esperanckich pism i towarzystw broszurę informacyjną w języku Esperanto i przystępuje wkrótce do wydawnictwa perjodycznego czasopisma esperanckiego.

Świeżo wydany **„Deutsches Adressbuch für Industrie, Gewerbe und Handel“** zawiera w rejestrze swym około **3000 pozycji firm w języku Esperanto.**

Wszechświatowa firma Rudolf Mosse w Berlinie, która nakładem swym wydała ten katalog, znaleźć winna naśladowców w innych krajach.

Poleca się to uwadze naszych wydawców i handlowców.

Stacja „Radio — Paris“ (9. III. długość fali 1750 m.) niespodzianie bez wszelkiej zapowiedzi rzuciła w przestrzeń odczyt esperancki Ernesta Archdeacon'a i rozpoczęła kurs Esperanta; kurs będzie wysyłany stale co niedziela o 8 m. 15, a ponieważ wyższa szkoła pocztowo-telegraficzna w Paryżu prowadzi również radjowy kurs języka Esperanto, **Paryż przeto posiada 2 stałe radjo-kursy esperanckie.**

W wielkim salonie magistratu m. **Wiednia** odbył się dn. 7. III. **wieczór esperancki.**

Przemawiali inspektor szkolny Dr. Wollman o znaczeniu Esperanta dla nauczycielstwa, dyrektor szkół miejskich Kronenberger i nauczyciel Smital. Obecnych było 250 osób głównie z pośród nauczycielstwa i miejscowych urzędników.

Zielony tydzień (Verda Semajno) **w Bułgarji** ziścił pokładane w nim nadzieje. Już po ukończeniu „Zielonego tygodnia“ zamówiono w Bułgarji **około 2000 podręczników** Esperanta. „Bulgara Esperantisto“ zaznacza, że promienie Zielonej gwiazdy Esperanta przeniknęły do najodleglejszych i najciemniejszych zakątków Bułgarji.

Esperancki organ **Wszechświatowej Ligi Policyjnej** „La Policisto" podaje, iż liga ta osiągnęła liczbę **1065 członków**

W Belgji najpoważniejsze gazety podają artykuły o języku Esperanto. **W Holandji** redaktor miesięcznika, poświęconego językoznawstwu handlowemu, **„De Spiegel van Handel en Wandel"** rozpoczyna **Kurs Esperanta** w redagowanym przez siebie miesięczniku. Jeżeli pomyślimy, że w miesięczniku tym drukują się kursy języków: holenderskiego, francuskiego, niemieckiego, angielskiego, ruskiego, hiszpańskiego i szwedzkiego, to drukowany kurs Esperanta nasunie wszystkim czytelnikom porównanie pomiędzy prostotą i logiką języka Esperanta, a trudnościami niezmiernemi innych języków i przekona o użyteczności Esperanta.

Tegoroczny **kongres francuskich esperantystów** odbędzie się w **Clermont-Ferrand** podczas Zielonych Świątek.

Na **paryską konferencję w sprawach wprowadzenia Esperanta do nauk ścisłych** Hiszpanja pomiędzy innymi wysyła 3 wybitnych uczonych: Leonardo Torres, Quevedę, Vincente Ingladę, wszechświatowej sławy badacza trzęsienia ziemi, i Emilio Hererę, słynnego znawcę nawigacji powietrznej. Wymieniona konferencja odbędzie się w Paryżu, w maju r. b. a brać w niej będą udział wybitni uczeni wszystkich krajów.

Program konferencji następujący:

1) Sprawozdanie z działalności „Związku naukowego" i innych technicznych esperanckich towarzystw różnokrajowych za czas od roku 1906 oraz rezultaty ich działalności.

2) Wspólne opracowanie metod działania na przyszłość, decyzje, które mają być przeprowadzone przez różne krajowe czynniki rządzące w celu nauczania języka i ułatwień użycia takowego przez uczonych i techników, metody godne polecenia przy opracowaniu technicznego słownictwa, zainaugurowanie trwałej organizacji, której będzie poruczone zrealizowanie decyzji konferencji, jakoteż wydawanie „Przeglądu Naukowego" (**Scienca Revuo**) w języku Esperanto.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Redakcio kaj Administracio: Warszawa, Widok 19.

Funkcias nur merkrede kaj vendrede de 7 ½ gis 9 h. vespere.

Ricevitaj gazetoj kaj libroj.

Academia pro interlingva (2). Arguso (2). Brazila Esperantisto (9-12). The British Esperantist (239, 240). Bulgara Esperantisto (5-6). Ekonomia Kuriero (1-3). Esperantista Junularo (25). Esperanto (1-3). Espero Katolika (Marto). Espero Teozofia (2). Germana Esperantisto (3). Heroldo de Esperanto (10-27). Holanda Esperantisto (157-160). Hungara Esperantisto (3). Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio (3). Interligilo de L. P. T. T. (3-4). International Language (2-3). Konkordo (oficiala organo de sudslavaj esperantistoj) (1-10). Kataluna Esperantisto (9). Literaturo (25). Marto (3). La Ora Epoko (9). La Progreso (4-5). Reklamo (3). Revista del Ateneo (8). La Revuo Orienta (1). La Semisto (48). La Suda Kruco (56). La Suno Hispana (93-94). Svenska Esperanto Tidningen (3-4). Verelotaal (12-13).

E. Lanty. La Langue Internationale. Ce que tout militant ouvrier doit connaitre de la Question.

Bensons Personal Mail Course Practical Esperanto. — Libreto kun bildoj, tre taŭga por komencantoj. Elekto de bildoj trafa kaj klare komprenebla. Sufiksoj kaj prefiksoj en bildoj elektitaj bonege. Traduko en aliajn lingvojn, ne nur ĉefajn, dezirinda.

Fabrikantoj de esperantaj insignoj!

Sendu viajn katalogojn kun prezaro kaj bildoj de la stoloj aŭ specimenoj senpagaj al

Pola Esperanto-Asocio

Królewska 19, Warszawa, Polujo.

Pola Esperanto-Asocio

Plej malnova kaj plej granda Esperantista Organizo en Polujo.

Agadrajto sur la tuta teritorio de la Respubliko.

Grupoj kaj Membroj-Korespondantoj en preskaŭ ĉiu granda pola urbo.

La agado de la Asocio kaj la „Poznanja Deklaro", deviga por ĉiuj membroj pruvas, ke la Asocio zorgas ne nur pri la propagando de Esperanto, sed ankaŭ ne forgesas pri pola propagando eksterlande. Ĝi kunigas Polujon kun la granda Rondo Familia de Popoloj en la senco de reciproka ekkono kaj simpatio.

Ĉiu Esperantisto, ĉiu Esperanta Grupo, al kiu niaj ideaĵoj, al kiu la potenco kaj unueco de nia landa movado estas karaj

ALIĜU TUJ AL POLA ESPERANTO ASOCIO!

Jara kotizo kaj enskribo Zł. 7. — Por Membroj — Subtenantoj Zł. 19. —

La granda intereso por ĈES-adresaro instigis nin aperigi

tuta senpage

la nomon kaj adreson de ĉiu samideano kiu vere intencas interkonatiĝi kun la tuta mondo.

Aliĝojn bonvolu sendi tuj al

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Servo

Praha II., Žitná 44.,

kiu eldonos ĈES-adresaron komence de la nova jaro.

Skribu legeble!

Varbu interesatojn!

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Presejo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Pańska 60.